

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №1



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №1 (279)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 70-71.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №1 (279).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 января 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Halina Gorecka. Trezoro Huang Yinbao, la Esperantisto de la Jaro 2017	6
Elektokomisiono de la Esperantisto de la Jaro	7
Ronda Tablo	8
Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2017.	9
Eventoj	17
Nicoleta Enache. La Zamenhof-jaro atingis sian kulminon	18
Nina Pietuchowska. Festaj Zamenhof-tagoj en la naskiĝurbo de Ludoviko	20
Povilas Jegorovas. Kaŭno: Zamenhof-Tagoj kaj kongreso de LEA	22
Aida Ĉiĝikaitė. En la urbeto, kiu lulis la unuan libron	25
Dek profesoroj en Romo	26
Sukcesa kunveno "Esperanto kaj Unesko" en Italio	26
Atentu: legado endanĝerigas stultecon	27
Ĉeestinto. Portu Vian lumon kaj kredu: Povilas Jegorovas honorita	28
Irina Gonĉarova. Esperanto en la 12a Moskva Lingva Festivalo	30
Vasil Kadifeli. Por lernantoj de Istanbul	31
Dennis Keefe. Novstila kurso lanĉiĝis en Seulo	32
"Demokratio sen limoj": bona surprizo en Esperantujo	34
JarKompaso	34
20a Jubileo pri la fondiĝo de Hanoja Esperanto-Asocio	35
Valentin Melnikov. En Ruslando kun AMO	36
Esperanto-kastelo atendas vin.	36
Kultura programo disvolvata, kongreso nuligita	37
Jefim Zajdman forpasis.	37
Koncize (9 informoj).	38
Tribuno	39
Richard Delamore. Esperanto en Interreto.	40
Komitatano Z. En tristo dronante (Vidpunkto)	48
Renato Corsetti. Per Esperanto por la rifuĝantoj	49
Lu Wunsch-Rolshoven. La temo tuŝas nin pli forte ol aliajn homojn	50
Elizabet Nelly Masemi Mbembi. Rifuĝantoj ne invadas.	50
Giorgio Silber. Tion instruas la historio de la esperanta popolo.	51
Deklaro de UEA okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2017	51

Arkivo	52
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Juan Régulo Pérez	53
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2018	56
Kulturo	57
Anton Ĉeĥov. Ŝuisto kaj malsankta potenco: Kristnaska rakonto (Tradukis el la rusa Valentin Melnikov)	58
Halina Gorecka. 111 – malronda jubileo, sed fekunda rikolto (Recenzo: <i>Esperanto</i> . <i>Lingvo kaj kulturo en Berlino kaj Brandenburgio. 111 jaroj. Jubilea libro 1903-2014</i>)	63
Teresa Nemere. Internacia Poezia Konkurso “Ĉe la rivero Vistulo”	64
Flo! Duobla albumo de <i>Krio de Morto</i>	65
<i>Literatura Foiro</i> , 2017, №289	66
Ricevitaj gazetoj	66
Mozaiko	67
Anton Ĉeĥov. Ĉampano (pensoj dum novjara postebrio) (Tradukis el la rusa Valentin Melnikov)	68
István Ertl. Spiritaj splitoj kaj preskeraroj	69
Kiel aboni <i>La Ondo</i>	70

Trezoro Huang Yinbao, Esperantisto de la Jaro 2017, ankoraŭ antaŭ la laŭreatiĝo estis la ĉefa persono en la solenaĵoj, okazintaj en la Pariza sidejo de Unesko okaze de la fino de la Zamenhofa Jaro. Cetere, en la voĉdonado por la Esperantisto de la Jaro la tutan “podion” okupis ekstereŭropanoj. Sed la ekstereŭropeco ne estas tiel klare videbla en la gvidorganoj de UEA, SAT, Civito kaj Akademio de Esperanto. (Foto de Huang Xiaojuan)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Ni gratulas al la ĉina aktivulo Huang Yinbao, konata en Esperantujo kiel Trezoro, kiu je la Zamenhofa Tago estis proklamita la Esperantisto de la Jaro 2017. Sur la supra foto apud li staras Jasmina Šopova, la redakcia direktoro de la plurlingva *Unesko-Kuriero*, kies Esperantan version en 2017 Trezoro lanĉis kaj ekredaktis. (Foto de Huang Xiaojuan, filino de Trezoro)

Trezoro Huang Yinbao, la Esperantisto de la Jaro 2017

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korjenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015) kaj Stefan MacGill (2016).

En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon.

Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 20 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Trezoro Huang Yinbao	11 voĉoj
Hori Jasuo	8 voĉoj
Richard Delamore (Evildea)	5 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Trezoro Huang Yinbao, 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto kaj entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Centro *Ora Ponto*, kunfondinto de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke en 2017 li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de *Unesko-Kuriero*, kunmetis por ĝi tradukteamon, kaj krome lanĉis la sendependan revuon *Tra la Mondo*.

***Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2017 Trezoro Huang Yinbao,
kiu estas la unua aziano, ricevinta ĉi tiun honoran titolon!***

Halina Gorecka
Sekretario

Elektokomisiono de la Esperantisto de la Jaro

Proponantoj

Marija Belošević (Kroatio): vicprezidantino de IKUE
Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto
Renato Corsetti (Britio): eksprezidanto de UEA
István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo
Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro
Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB
Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano
Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU
Aleksander Korjenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro
James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL, aktivulo de Skolta E-Ligo
Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de Amikumu
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Sibayama Zyun'iti (Japanio): estrarano de JEI, ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*
Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto

Elektantoj

Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I
Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de KAVA-PECH
Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE
Mireille Grosjean (Svislando): prezidanto de ILEI
Anna Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK
Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*
Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista
Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM
Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko
Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): direktoro de Esperanto-Centro *Ora Ponto*, konsiliano de UEA
Stano Marček (Slovakio): redaktoro de *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell*, eksredaktoro de *Esperanto kaj Esperantisto Slovaka*
Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAEM
Stefan Maul (Germanio): eksĉefredaktoro de *Monato*
Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors
Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio
Martin Schäffer (Meksiko/Germanio): Ĝenerala Sekretario de UEA
Syôzi Keiko (Japanio): revizoro de JEI, eldonanto ĉe *Libroteko Tokio*

Sekretario

Halina Gorecka (Ruslando): eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

Ronda Tablo



Ankaŭ ĉi-jare ni petis diverstendencajn aktivulojn respondi la tradician demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) en la 2017a jaro, laŭ via opinio, estas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”. Ni ricevis respondojn de 15 personoj: Peter Baláž, Anna Bartek / Anjo Amika, Renato Corsetti, Mark Fettes, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gončarova, Mireille Grosjean, Trezoro Huang Yinbao, Dennis Keefe, Katalin Kováts, Vinko Markovo, Chuck Smith, Humphrey Tonkin, José Antonio Vergara kaj Łukasz Żebrowski. Multaj el ili menciis kiel pozitivajon la unuan Afrikan IJK. (Foto: Peter Baláž)

Niaj atingoj kaj malsukcesoj en 2017

Mireille Grosjean (Svislando)

Prezidanto de ILEI

La aperigo de la *Unesko-Kuriero* en Esperanto certe estas mejloŝtono en nia movado. Aperis tri numeroj el kvar en la jaro 2017. Tamen ĉu ni ĉiuj sukcesos traduki, eldoni kaj dissendi po kvar numerojn jare dum jardekoj? Jen la demando. Nepe la tuta movado kunlaboru por atingi tiun brilan kaj longdaŭran agadon.

Multiĝas la lernantoj de Esperanto, aperas alvokoj por akiri la helpon de Esperanto-instruistoj, tio montras kreskantan intereson pri nia lingvo. Ni ĉiuj devas reagi pozitive kaj efike: fortigi niajn lingvajn kapablojn, adekvate informi pri nia lingvo, uzi la programon “Unu leciono pri eo por ĉiu lerneĵano” (Vidu <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>). La mondo nun pensas pragmate, kaj en plej diversaj lokoj homoj vidas la avantaĝojn de komuna lingvo. La situacio por Esperanto nun estas aparte favora.

Mi miras, kiom multe kaj senutile homoj sukcesas babili en la retforumoj. Kie ili trovas la temon tra siaj tagoj por tiom da vanaj diskutoj, kiuj neniel progresigas nian aferon. La modernaj komunikiloj estas mirindaj helpiloj por efike kunlabori, sed misuzo abundas. En miaj ĉiutagaj retmesaĝoj (50 ĝis 100) mi viŝas pli ol mi legas...



Chuck Smith (Usono/Germanio)

Kunfondinto kaj teknikestro de Amikumu

La plej grandaj sukcesoj ĉi-jare estis sendube la *Unesko-Kuriero* kaj Amikumu. La *Unesko-Kuriero* estis longtempa laboro de Trezoro kaj tre sukcesa. Tio kondukis al granda solena evento “100 jaroj post Zamenhof” en la ĉefa sidejo de Unesko en Parizo! Tie ses homoj prelegis kun interpretado en Esperanton, la anglan kaj la francan.

Aliteme, la apo Amikumu lanĉiĝis en aprilo (por Esperanto) kaj en aŭgusto (por 7000+ lingvoj) kaj jam havas pli ol 8000 membrojn en 130 landoj, kiuj parolas 400 lingvojn.

Pri malsukcesoj, mi nur bedaŭras, ke la Esperanto-kurso ĉe Duolingo por portugallingvanoj ne progresas tre rapide, sed ĝia teamo strebos liveri ĝin antaŭ la UK en Lisbono. Pri la kurso por anglalingvanoj, ni kune kun la Akademio de Esperanto finpretigis version 2.0 julie. Bedaŭrinde pro neantaŭvideblaj problemoj de Duolingo ekster nia rego, okazis prokrasto, sed ŝajnas, ke ili tamen sukcesos ekdisvastigi la novan version en februaro 2018.



Peter Baláž (Slovakio)

E@I-kunordiganto, estrarano de EEU

Pozitivaĵoj:

- skanado kaj publikigado de multaj historiaj tekstoj de la Viena E-muzeo (ankaŭ multaj pri Zamenhof), okaze de la 100-jara jubileo de la morto de Zamenhof;
- la unua IJK en Afriko, kiu malgraŭ diversaj problem(et)oj estas historia evento por la tuta Esperanto-movado;
- ege sukcesa “Polyglot Gathering” en Bratislavo, kiu iĝis la plej granda renkontiĝo de plurlingvuloj tutmonde;
- multaj EU-projektoj (Erasmus), subtenantaj rekte Esperanton;
- daŭre pligrandiĝanta kvanto de retaj Esperanto-lernantoj (lernu kun pli ol 260.000 kaj Duolingo kun pli ol miliono da uzantoj);
- kreo/lanĉo de la retejo www.zamenhof.info de E@I, okaze de la 100-jara mort-datreveno de L.L.Zamenhof.

Negativaĵoj:

- daŭraj problemoj ĉe CO de UEA, ĉefe la personaj problemoj rilataj al la direktoro);
- daŭra malkresko de membroj sed ankaŭ de aktivuloj en diversaj Esperanto-organizoj internaciaj, naciaj kaj junularaj.



Anna Bartek / Anjo Amika (Hungario)

Kantistino, senatano de la Esperanta Civito

Pozitivaj Esperanto-Eventoj en 2017:

Organizita de Kultura Centro Esperantista kaj aŭspiciita de TEJO, JARTE (Junulara Arta Renkonto Transnacia en Esperanto) disvolviĝis la 17-22an de julio 2017 en Teatro ABC kaj du koncertoj en la domo de Framasona Societo.

La 24-28an de julio 2017 en Kultura Centro Esperantista disvolviĝis Esperantologia Fakultato pri temoj: Historio de Afriko, Komunikado kaj Informado kaj Parlamenta Tekniko. La prelegantoj estis: prof. Baroncelli, Lu Wunsch-Rolshoven, prof. Giorgio Silfer.



Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Ne nur grizharaj veteranoj, vegetaranoj kaj veterinaroj festas la Zamenhofan Tagon, sed ankaŭ junuloj kaj infanoj – tiel okazas almenaŭ en la naskiĝurbo de Ludoviko, kie Esperanto estas instruata (de Elżbieta Karczewska) eĉ en unu el la Bjalistokaj infanĝardenoj. (Foto: Nina Pietuchowska)

La Zamenhof-jaro atingis sian kulminon

Pli ol 150 personoj direktis sin al Parizo por partopreni la konferencon okazigitan kadre de Unesko en ĝia prestiĝa sidejo, por marki la finon de la Zamenhofa Jaro 2017. Tiu kunsido rezultis el grandegaj fortostreĉoj de la Unesko-teamo de UEA en Parizo kaj aliloke. Antaŭis ĝin AMO, kaj postsekvis fruktodona kunsido kun la ĉefredaktoro de *Unesko-Kuriero*. Pri la konferenco rakontas Nicoleta Enache el Rumanio, kiu troviĝas meze de unujara volontulado en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.

La 11an de decembro mi havis la ŝancon partopreni la memorkonferencon por la centa datreveno de la forpaso de Zamenhof. La memorkonferenco “Tutmondiĝo, Interreto kaj Unesko-Kuriero” okazis en la salono II de la sidejo de Unesko en Parizo kaj kunigis pli ol 100 homojn el pluraj landoj. Inter la partoprenantoj estis multaj esperantistoj, reprezentantoj de membro-ŝtatoj de Unesko kaj oficistoj de Unesko.

Partopreno en tiu ĉi evento donis al mi valorajn lernajn spertojn. Ekzemple, la evento estis granda okazaĵo por kunvenigi homojn kun tia riĉa sperto, interagi kaj interŝanĝi bonajn praktikojn. Rigardante malantaŭen al la konferenco, ne estas por mi facile resumi ĉiujn valorajn ideojn, kiuj estis dividitaj dum la tago. Mi mencias sube kelkajn el la ĉefaj ideoj, kiujn mi prenis kiel personajn lernaĵojn.

La konferenco estis dividita en tri partoj – malfermo, unua parto kaj dua parto. La malfermo komenciĝis per la alparolo de Krystyna Źurek, konstanta delegito de Pollando ĉe Unesko, kiu direktis la atenton de la partoprenantoj al la ĉefa temo de la konferenco kaj substrekis ĝian gravecon. Ni havis ankaŭ la okazon aŭskulti la vortojn de Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. Zamenhof, kaj la vidpunkton de Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA. Nome de Unesko parolis Frank La Rue, asista direktoro de Unesko pri komunikado kaj informado.

La du partoj de la konferenco estis strukturitaj jene:

Unua sesio:

Sébastien Moret: “Kial Esperanto venkis”;

Jean-Claude Lescure: “Esperanto fronte al tutmondiĝo”;

Guilherme Fians: “Esperanto nuntempe kaj fronte al sia estonto: komunumo kaj ĝiaj komunikiloj”.

Dua sesio:

Chuck Smith: “La modernaj komunikiloj serve al Esperanto”;

Trezo Huang Yinbao: “La Unesko-Kuriero en Esperanto”;

Giorgio Novello: “Ĉu nova lingvo por Unesko?”.

Ĉiuj intervenoj estis tre interesaj kaj riĉigis min per informoj kiujn mi ne konis antaŭe. Mi specife interesiĝis pri kio helpis Esperanton daŭre disvastiĝi, kaj kiel malsamas Esperanto disde aliaj artefaritaj lingvoj, kiuj naskiĝis en la 19a jarcento kaj ne plu vivas. La prelegoj donis al mi pli da kompreno kaj klareco.

Mi plifortigis mian certecon, ke Esperanto estas ne nur lingvo lerninda, sed



En la Pariza sidejo de Unesko okaze de memorfesto de la 100a mortodatreveno de Zamenhof (Foto: Aleks André, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=64771639>)

ankaŭ vigla movado kiu kontribuis al la disvolviĝo de internaciaj aferoj kaj disvastigo de inventoj kaj sciencaj novaĵoj. Esperanto pozitive influis turismon kaj vojaĝadon kaj eĉ permesis kontakton inter samaliancaj militpotencoj. Ĝi ankaŭ faciligis komunikadon inter esperantistoj, specife inter homoj el malsamaj kulturoj kaj kun malsamaj spertoj.

Siamaniere Esperanto ŝanĝis la vivon de multaj homoj kaj ebligis interkomunikadon kaj lernadon. Ĉiuj el tiuj aspektoj pruvis ke Esperanto temas pri pli ol lerni lingvon, kaj ke ĝi kongruas kun la valoroj kaj vizioj de UN kaj Unesko.

Inter la temoj kiuj kaptis mian atenton estis la prelego pri la uzado de amas-komunikiloj kaj moderna teknologio serve al Esperanto. Prezentata kiel vojaĝo tra la tempo, la sesio montris, kiel modernaj teknologioj ŝanĝis nian manieron komuniĝi kaj bildigis la rimedojn kaj aplikaĵojn, kiuj donis novan dimension al Esperanto.

Aldone mi havis la ŝancon renkonti novajn homojn kaj interagi kun ili dum la paŭzoj. La ebleco interkonekti, lerni unu de la alia kaj esplori ideojn estis valora sperto. Mi certe povas diri ke tiu konferenco estis sencoplana por mi kaj mi ĝojas esti partopreninto. Mi deziras aldoni, ke ĉio estis bone organizita kaj ĉiuj prelegantoj esprimis honestajn opiniojn rilate al sia temo kaj disdonis ege valorajn informojn.

Nicoleta Enache
EKO de UEA

Festaj Zamenhof-tagoj en la naskiĝurbo de Ludoviko

La 18aj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj okazis en Bjalistoko la 15-17an de decembro. Tre malofte ni havas eblecon komenci la tagojn ĝuste en la tago de la naskiĝdat-reveno de Ludoviko Zamenhof kiel ĉi-jare. Nia aranĝo estis la lasta programero de la festado de la Zamenhof Jaro en lia naskiĝurbo.

Vendrede multaj lokaj esperantistoj, urbanoj, gastoj eksterlandaj kaj el diversaj polaj urboj kunvenis apud la monumento al Zamenhof. Ĉi tie okazis festparoladoj de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski kaj de la prezidanto de BES Przemysław Wierzbowski, kaj poste flormetado ĉe la monumento. La solena malfermo de la Tagoj okazis en la kafejo *Fama*. Post ĝi amatora teatro el la bjalistoka 51a bazlernejo “L. L. Zamenhof” prezentis la teatraĵon *Rapeto* de Julian Tuwim.

Multaj personoj malpacience atendis rezultojn de la literatura konkurso “Esperanto – mia kolora mondo”. Organizis ĝin la bjalistoka Esperanto-libraro. La rezultojn de la konkurso anoncis Elżbieta Karczewska. Ŝi informis, ke por la konkurso venis 16 verkoj el diversaj landoj. Laŭ la decido de la konkursa ĵurio la plej bona estis verko de Anna Ulman *Li, ŝi, ili*, kaj ŝi gajnis la unuan lokon. Ĉiuj verkoj aperis en la 7a numero de *Bjalistokaj Kajeroj*, kiun ĉiuj partoprenantoj ricevis senpage.

Pri aranĝoj, kiuj okazas dum la Zamenhof Jaro 2017, rakontis Barbara Pietrzak. La sekva programero estis ĵaza koncerto de Maciej Fortuna el Poznano kaj de lia ensemblo. La vendreda tago finiĝis malfrue en nia klubejo en amika etoso... Sabate podlaĥiaj ĉiĉeronoj el Pola Societo Turista Landkona (PTTK) organizis komunan promenadon “Vojo de Ludoviko al la lernejo”.

Kun Ludoviko ni renkontiĝis apud la bjalistoka urbodomo kaj kune promenis al la loko, kie staris la domo, en kiu naskiĝis la kreinto de Esperanto. Fine ni atingis la lokon, kie situas la iama reala gimnazio, en kiu lernis Ludoviko. Ĉiuj partoprenantoj de la promonado ricevis flugfoliojn pri Zamenhof kaj pri la Zamenhofa Jaro 2017.

Esperantistoj venis al la Zamenhof-Centro (CLZ). Okazis en ĝi prezento de animaciaj filmoj pri Ludoviko, preparitaj de infanoj en CLZ sub gvido de Ewa Małyszko, kiu rakontis, kiel aspektis la laboro dum filmado de ĝi. Artan surprizon preparis al ni infanoj el la 52a infanĝardeno Kubuś Puchatek. Ili sub gvido de Elżbieta Karczewska lernas Esperanton. EVS volontulo Marc Konijnenberg preparis kvizon pri lingvoj de la



En Bjalistoko (Foto: Nina Pietuchowska)



Maciej Fortuna kun siaj muzikistoj koncertas en Bjalistoko (Foto: Nina Pietuchowska)

mondo. Ne mankis ankaŭ la sankta meso, kiun en t. n. blanka preĝejo celebris Roman Gmyrek – la kapelano de polaj esperantistoj.

Posttagmeze okazis preletoj: Aleksander Zdechlik reklamis la sekvontjaran polan kongreson en Zabrze – subtere en iama karbominejo; pri polaj komiksoj rakontis Przemysław Wierzbowski, ankaŭ pri la komikso *Kajko kaj Kokoŝo*, kiun li tradukis en Esperanton; Nina Pietuchowska rakontis pri la bjalistoka infanaĝo de Ludoviko; Jagoda Greger parolis pri profesiismo en la amatoreca Esperanto-movado omaĝe al Ewa Siurawska, kiu forpasis ĉi-jare. La sabatan artan programon preparis du bjalistokaj ensembloj: la infana *Uku-donaco* kaj *Frey-Lech Trio* sub la gvido de Lech Mazurek.

La aranĝon en CLZ ni finis per la naskiĝtaga torto de Ludoviko, ĉiuj infanoj senpacience atendis momenton, kiam ili povos gustumi ĝin. Dum la tuta sabata tago funkciis nia riĉa libroservo. Ĉiuj dezirantoj povis viziti la ekspozicion pri Ludoviko en CLZ. Ankaŭ sabate en nia klubejo okazis la vespera amika rondo.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



La kulturministrino Liana Ruokytė-Jonsson donas la honorsignon al Povilas Jegorovas

Portu Vian lumon kaj kredu: Povilas Jegorovas honorita

La 14an de decembro en la historia Urbodomo de Vilno okazis solena ceremonio organizita de la Litovia ministerio de kulturo, en kiu la ministro de kulturo Liana Ruokytė-Jonsson enmanigis diversajn premiojn kaj honorigojn de la ministerio al 35 personoj. Inter ili tri personoj ricevis la plej altan distingon de la ministerio – la honorsignon “Nešk savo šviesa ir tikėk” (Portu Vian lumon kaj kredu). Unu el ili estis la prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas, kiu ricevis ĝin “pro grava kontribuo kaj grandaj meritoj al la Litovia kulturo, pro inspiraj iniciatoj por pozitiva agado en la komunumo, pro persona respondeco en kreado de kultura kaj spirita etoso, pro firmigo de kultura dialogo, flegado de nacia konkordo, kreskigo de la humanismaj valoroj en la socio, kaj pro la multjara esperantista agado”.

La ceremonion ĉeestis ankaŭ la vicministro de kulturo Gintautė Žemaitytė. Al la ceremonio estis invititaj pli ol ducent kulturagantoj kaj funkciuloj, inkluzive de la unua vicprezidanto de LEA Audrys Antanaitis, vicprezidanto de LEA Arimantas Račkauskas, respondeca sekretario de LEA Irena Alijošiūtė, prezidanto de la Vilna Esperanto-Societo Algimantas Piliponis kaj ankoraŭ kvin esperantistoj de



Vilno. La ceremonion gvidis la konata litova aktoro Gintaras Mikalauskas. Ĉiu honorito fare de la prezidanto de la kunveno estis prezentita per proksimume duonpaĝa teksto, pri Povilas Jegorovas estis notitaj liaj ĉefaj agadoj en la Esperanto-movado.

Komence de la ceremonio Liana Ruokytė-Jonsson gratulis ĉiujn honoritojn, substrekis la gravecon de iliaj kulturaj agadoj kaj ĝojis pro la riĉa kaj diversflanka kultura vivo en Litovio. Ricevinte la honorsignon, Povilas Jegorovas en sia kelkminuta dankparolado emfazis lingvajn problemojn internacie kaj en la lando kaj diris, ke esperantistoj en ĉi tiuj temoj povas diri siajn tre firmajn vortojn. Laŭ la instigo de la prezidanto de la kunveno, li fine diris kelkajn frazojn en Esperanto, bondezirante okaze de la proksimiĝantaj Kristnasko kaj Novjarfesto al ĉiuj, kio ege vigligis la plenan salonon da ĉeestantoj.

Dum paŭzoj en la sufiĉe longa ceremonio tre bele kaj bonhumore kantis la fama junulara koruso “Kivi”. Partoprenis multaj ĵurnalistoj kaj fotistoj. Krom multaj fotoj dum la premiado fine estis farita komuna foto de ĉiuj premiitoj kun la ministro de kulturo. La ceremonion kronis abunda akcepto de la ministro. Pri la evento vaste informis diversaj amaskomunikiloj de Litovio, ankaŭ la ĉefa vespera novaĵprogramo de la Litovia nacia televido “Panorama” kaj la retejo de la kulturministerio.



Pri la honorigo decidis speciala naŭpersona ministeria komisiono, en kiu estas tri vicministroj kaj kelkaj aliaj altrangaj funkciuloj de la ministerio. La rekomendon atribui al Povilas Jegorovas la honorsignon “Portu Vian lumon kaj kredu” faris la prezidanto de la parlamenta komitato pri kulturo Ramūnas Karbauskis. Povilas Jegorovas ricevis honorsignon №40. Tio signifas, ke ekde 1990 ĝis nun nur 40 homoj ricevis ĉi tiun altan distingon.

Ĉeestinto

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kosta nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Richard Delamore, pli konata kiel Evildea, entreprenis enketon pri Esperanto en Interreto, kiun respondis preskaŭ cent esperantistoj. Komprenoble, la enketo ne spegulas la opiniojn de ĉiuj esperantistoj, tamen ĝi donas utilan superrigardon pri la elektoj de la impete kreskanta reta esperantistaro, kiun ofte ignoras la gviduloj de la tradicia movado.

Esperanto en Interreto

En novembro mi publikigis enketon pri Esperanto en Interreto. Por kolekti diversan gamon de opinioj, mi afiŝis mian enketon en Reddit, Fejsbuko kaj Tvitero. Ankaŭ mi retroŝtis ĝin al miaj konatoj el la tuta mondo kaj petis, ke oni diskonigu ĝin. 86 homoj respondis al la enketo. Kompreneble, la enketo ne spegulas la opiniojn de ĉiuj esperantistoj, tamen ĝi donas utilan superrigardon pri la ĝenerala interrete konektita esperantistaro.

Komence mi intencis verki mallongan artikolon surbaze de ties rezultoj tamen evidentiĝis, ke pli profunda analizo necesis. Mi decidis disponigi al ĉiuj la datumojn kaj petis la opiniojn de aliaj fakuloj pri Esperanto en Interreto. Jen niaj kontribuantoj:

Richard Delamore, kiu uzas la kaŝnomon Evildea, estas fama Esperanto-Jutubisto kaj kunfondinto de Amikumu.

Chuck Smith estas fondinto de la Esperanta Vikipedio, kunorganizanto de la Polyglot Gathering, kontribuanto de la kurso de Esperanto ĉe Duolingo, kaj kunfondinto de Amikumu.

Robert Nielsen estas Esperanto-blogisto, eksvolontulo kaj retumanto.

Robin van der Vliet estas kunordiganto de la grandega komunumo en Telegramo.

Se vi unue konatiĝis kun Esperanto per Interreto, kie vi unue aŭdis pri ĝi?

Vikipedio.....	21.70%	Forumo.....	6.50%
Jutubo	19.60%	Lernu.net.....	4.30%
Reddit.....	15.20%	Podkasto	2.20%
Amiko	10.90%	Libro	2.20%
Artikolo	8.70%	Videoludo	2.20%

Richard (Evildea): Ne surprizas min, ke Vikipedio estas tiel elstare reprezentita. Sep jarojn antaŭe mi mem hazarde malkovris Esperanton per Vikipedio. Mi memoras, ke mi estis leganta artikolojn kaj sekvis ligilojn, kiam mi trafis artikolon pri internaciaj lingvoj. Baldaŭ poste mi trovis la unuan mencion pri Esperanto.

Kiel Esperanto-jutubiston, ankaŭ ne surprizas min la granda efiko de jutubo. Famaj prilingvaj jutubistoj kaj blogistoj kiel Benny Lewis, Steve Kaufmann kaj Lindsay Williams bone prezentis Esperanton al sia spektantaro.

Chuck Smith: Estas iom nekredinde por mi, ke mia laboro pri Vikipedio en 2001 estis tiom fruktodona! Mi bedaŭras, ke multaj el la tradicia movado ne ĝuste komprenas la gravecon de Vikipedio, JuTubo kaj Reddit kaj ties influon al la junularo.

Fakte, plej efike tiurilate estis ĝuste la agado de Judith Meyer pri la filmeto *Esperanto: Like a Native* (la titolo estas angla vortludo, kiu povas esti tradukita kiel “Kiel denaskulo” aŭ “Ŝatu denaskulon”) en kiu ŝi intervjuis ses denaskajn esperantistojn. Ŝi rimarkis, ke neesperantistoj plej interesiĝas pri denaskaj esperantistoj,

do decidis krei filmeton pri tio. Poste ŝi planis sesion en Reddit kie ĉiuj povus demandi ion ajn al la denaskuloj. Tio surprize eĉ atingis la ĉefpaĝon de tiu famega retejo kaj nekredeble multe da homoj spektis la filmeton. Fakte, laŭ statistiko tiu filmeto estis spektita pli ol 325.000-foje! Indas pripensi similajn iniciatojn por diskonigi la lingvon.

Robert Nielsen: Ankaŭ por mi, Vikipedio estas komprenebla elekto. Kiam mi volas lerni pri ia nova afero, mi kontrolas tie. Jutubo montras la gravecon de novaj medioj per kiuj junuloj informiĝas pri la mondo. Por mi la plej granda surprizo estas la graveco de Reddit, ĉar multaj esperantistoj ne konas ĉi tiun retejon.

Se vi unue lernis Esperanton per Interreto, kiujn lernilojn vi precipe uzis por lerni la lingvon?

Duolingo	44.50%	Bitlibro	1.80%
Lernu.net	26.40%	Anki	0.90%
Eksterinterrete	6.40%	Bab.la.....	0.90%
Vikipedio.....	6.40%	Fejsbuko.....	0.90%
Memrise	4.50%	Kurso.br.....	0.90%
Retejo	2.70%	Retpoŝta kurso.....	0.90%
Jutubo	2.70%		

Richard (Evidea): Antaŭ du jaroj, kiam Duolingo debutis kun Esperanto-kurso, kelkaj eminentuloj publike esprimis sian dubon pri la efikeco de retaj instruiloj. Nun du jarojn poste la aktualaj rezultoj montras, ke retaj instruiloj ne nur efikas, sed ankaŭ kreas tute novan generacion de aktivuloj. La tradiciaj metodoj de instruado nun palas kompare al la granda ondo da freŝbakitoj naskiĝintaj per lernu.net (mia bakejo) kaj poste Duolingo.

Chuck Smith: Mi jam iom miras, ke ĝuste pli ol duono el la lernantoj lernas Esperanton per Duolingo kaj Vikipedio! Tio estas tute alia sperto ol la 10-leciona retpoŝta koresponda servo per kiu mi lernis en 2001. Se mi komencus lerni Esperanton hodiaŭ, mi verŝajne mem komencus per Duolingo kaj Lernu, do ne surprizas min, ke homoj tiel lernas.



duolingo

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

En tristo dronante



UEA fariĝis preskaŭ tro trista temo por meriti komentojn, ĉar el ili ja nenio sekvas. Post la popolisto Renato Corsetti kaj la ne-komprenebla Probal Dasgupta, Mark Fettes estas prezidanto, kiu estas surda ne nur al niaj rimarkoj sed eĉ al siaj propraj spertoj.

Ekde la 1990aj jaroj Fettes estis la kronprinco de UEA. Jam frue li fariĝis tre populara, kaj precipe per la lanĉo de sia Praga Manifesto (1996) li ŝajnis posedi potencialon enviciĝi apud La-

penna kaj Tonkin kiel unu el la plej elstaraj gvidantoj de UEA post la dua mondmilito. Pri tio li certe ankaŭ mem revis, volonte referencante al tiuj du en siaj artikoloj kaj eĉ klopodante, kvankam malpli sukcese kaj foje komike, paŭsi ilin ankaŭ retorike. Siatempe ankaŭ ni en tiu ĉi kolumno privetis lin kiel tiun, kiu kondukos la vegetantan UEA al pli hela estonteco, sed ni devis rapide agnoski nian naivecon.

Nia naiveco tamen estas pardonebla, ĉar ni povis nur observi, sed tiu de Fettes ne pardoneblas, ĉar ekde 2013 li havis la ŝnurojn en siaj manoj. Li havis plenan rajton fari ankaŭ erarojn, sed li devis lerni el ili, kaj tion li ne faris. Liaj plej fatalaj eraroj estas tiom konataj al ĉiuj, ke oni eĉ priridas lin pro ili, nome la miselektoj de redaktoroj kaj de (almenaŭ unu) ĝenerala direktoro. En ĉiu kazo montriĝis rapide, ke temis pri miselekto, sed ĉe la kapo de UEA evidente Fettes estis la lasta por agnoski tion. Aparte humiliga por li devis esti la plej freŝa kazo, la forsendo de Veronika Poór kiel la ĝenerala direktoro. Kvankam sensperta pri gvidado de oficejo kaj movada novico, por Fettes tio verŝajne estis nur kvalitoj por renovigi la oficejon kaj la asocion, dum la 15-jara sperto de Nikola Rašić kiel KKS malkvalifikis lin por la posteno. Fettes estis tiom konvinkita pri sia pravo, ke li eĉ dungis Poór kun senlima laborkontrakto.

Ni ne miros, se la elekto de Martin Schäffer kiel posteulo de Poór montriĝos laŭvica maltrafo. Pri labora kaj movada sperto li larĝe superas ŝin, sed lia kono de la CO estas nula apud Victor Sadler, Simo Milojević kaj Osmo Buller, kies sukceso ne laste havis sian bazon en ilia multjara laboro en la CO jam antaŭe. Eblaj kvalitoj tamen ne multe helpas Schäffer al sukceso, ĉar li faros sian laboron eksterlande, nur de tempo al tempo aperante en Roterdamo. Kritikantoj jam atentigis, ke en oficejo kiel la CO povas aperi ĉiutage kaj eĉ neatendite situacioj, kies solvado postulas direktoran decidon. Eĉ bagatelaj aferetoj, pri kiuj la direktoro normale decidus en unu minuto, estonte postulos retmesaĝadon aŭ devos atendi la viziton de la transoceana estro.

Nun la komitato de UEA prepariĝas por elekti novan ĝeneralan sekretarion post Schäffer. Kiu tamen sekvis la ĝisnunan funkciadon de la estraro, povas demandi

sin, ĉu tio necesas, ĉar aparte laborema estrarano Schäffer ne ŝajnis esti. Diversajn kontaktojn kun la komitato, kiujn normale prizorgas la ĝenerala sekretario, faris tamen Fettes aŭ Stefan MacGill. Se la statuto postulas ĝeneralan sekretarion, pli simple estas doni la taskon al iu el la nunaj sentitolaj estraranoj. Oni tamen volas eĉ pligrandigi la estraron per du pliaj membroj, ĉar laŭdire la nunaj estraranoj estas tro ŝarĝitaj per laboro. Almenaŭ de ekstere ne videblas troŝarĝiteco krom ja en la kazo de MacGill, kiu transprenis taskojn antaŭe prizorgitajn de la direktoro. Por tiuj taskoj Poór montriĝis malkapabla, eĉ se por la fasado ankaŭ ŝi pravigis tion pli bele per manko de tempo. Schäffer do malplipezigu la vivon de MacGill kaj faru mem ĉion, por kio oni lin pagos. Oni ne bezonas aldonajn estraranojn, ĉar ankaŭ de la nunaj ni esperas seniĝi tiel baldaŭ kiel eble.

Komitatano Z

Per Esperanto por la rifuĝantoj

Xavi Alcalde en sia artikolo *Per Esperanto por la rifuĝantoj* demandas:

“Ĉu oni jam rikoltis sufiĉe da intereso kaj emo kunlabori por starigi internacian stabilan kunordigon de aktivado por rifuĝintoj per Esperanto?”

Mi pensas, ke ne. Oni debatis pri tiu problemo dum MEK en Urgupo en Turkujo. Oni multe parolis pri grandskalaj projektoj, kiujn oni devus aranĝi kunlabore inter UEA kaj UNHCR, sed sen iu ajn pritakso de la bezonataj kunordigaj fortoj. Oni ankaŭ pensis pri lanĉo de grandskala agado en pluraj rifuĝintaj tendaroj, sed ĉiam sen praktika penso pri la bezonata laboro kaj laborantoj por praktike realigi tion.

Oni aŭdis pri lokaj provoj kontakti rifuĝintojn en Germanujo kaj Svedujo. Temis pri sufiĉe malgrandskalaj aferoj. La sola konkreta agado efektivigata estas tiu de Annie Grente en Grekujo. La rezultojn oni povas interpreti diversmaniere, sed el la vidpunkto de praktika utiligo de Esperanto oni devas kompreni, ke rifuĝintoj ne estas stultaj kaj ke ili komprenas kiujn lingvojn ili bezonas.

En la kadro de la kampanjo por disvastigi lernolibrojn de Esperanto al la araboj mi ricevis kelkajn petojn el eŭropanoj pri libroj disdonataj al iliaj arablingvaj konatoj en Eŭropo, sed temas pri homoj jam iel establiĝintaj en eŭropaj landoj.

“Ĉu ekzistas hodiaŭ iu alia maniero apliki plej klare kaj preme la internan ideon de nia kara lingvo?”

Certe helpo al la rifuĝintoj estas maniero apliki la solidarecan internan ideon de Esperanto, kiu memorigas pri la helpo dum la unua mondmilito de la Esperantomovado. Sed oni povas pensi pri aliaj manieroj, interalie disinformi pri la respondeculoj pri la elmigrado, kiuj ne transprenas la respondecon pri tio, kion ili kreis. Ĉu sen la milito en Sirio komencita de Usono pere de siaj lokaj aliancanoj, estus tiom da siriaj rifuĝintoj? Ĉiuokaze tio estas alia temo.

Renato Corsetti



La temo tuŝas nin pli forte ol aliajn homojn

Mi konas kvar homojn kaj parojn, kiuj aktive helpas al rifuĝintoj, tri el ili parolas Esperanton. Estas iom evidente, ke la temo tuŝas nin pli forte ol aliajn homojn.

Mi tre ĝojis ekscii, ke ja ekzistas sukcesa instruado de Esperanto al rifuĝintoj – plurfoje mi aŭdis la eraran argumenton, ke tio ne havas sencon, ke ili ja devas lerni la lingvon de la gastlando. Sed, pravege, vi atentigis pri la amaso da tempo, kiun ili havas. Ili simple ne havas la eblecojn kaj la energion por lerni alian lingvon de mateno ĝis vespero, restas pluraj horoj por lerni Esperanton.

Verŝajne taŭga loko por internacia kunagado pri tio estas nuntempe Facebook-grupo, facile kreebla.

Pri UEA aŭ landa asocio aŭ alia asocio oni ne esperu – ili ĉiuj havas jam siajn taskojn kaj problemojn kaj ne havas liberan kapaciton. Aldone UEA evitas politike engaĝiĝi – ŝajne, eĉ kiam homaj rajtoj estas vunditaj. (Oni pli kaj pli vidas, ke tio havas siajn konsekvencojn por la prestiĝo kaj allogo de tia asocio.)

Lu Wunsch-Rolshoven

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 25 jaroj forpasis Juan Régulo Pérez (1914-1993), konsiderata kiel la plej grava Esperanto-eldonisto. Okaze de la 25a mortodato ni publikigas artikolon pri li el la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*. (Foto: L. Trujillo Casañas)

Juan Régulo Pérez

Juan Régulo Pérez naskiĝis la 30an de marto 1914 en la vilaĝo Cueva del Agua, komunumo Garafía, en la kanaria insulo La Palmo (Hispanio) en malriĉa kampara medio. Patro: Manuel Pérez de Paz (1884-??), patrino: Emérita Florencia Pérez Rodríguez (1885-1953). Ĉe la naskiĝo li ricevis la personan nomon Juan Régulo kaj la familian nomon Pérez Pérez; en 1961 sekve de lia peto per leĝa dekreto la persona nomo Juan Régulo estis ŝanĝita al Juan, kaj la familia nomo Pérez Pérez al Régulo Pérez.

La patro ne loĝis kun la familio, kaj en 1924 la patrino kun la du filoj (la pli juna filo Francisco Claudio Pérez Pérez naskiĝis en 1915 kaj mortis en 1939) forlasis la vilaĝon kaj transloĝiĝis al Santa Cruz, la ĉefurbo de la insulo. En 1929 la 15-jara junulo ekstudis en la Normala Eduka Lernejo en La Laguna kaj en 1933 diplomiĝis kiel elementlerneja instruisto.

En 1933-36 li laboris kiel instruisto en kelkaj loĝlokoj de La Palmo kaj Tenerifo. Krome li verkis artikolojn kaj en 1935 iĝis redaktoro de la semajnjurnalo *Espartaco* (Santa Cruz de La Palma). Komence de la intercivitana hispania milito (1936-39) oni maldungis lin kaj nuligis lian instruistan diplomon. En la komenco de 1937 Juan Régulo estis arestita, sen akuzo kaj juĝo pasigis tri jarojn en punlaborejoj en Hispanio kaj Maroko. Liberigita en 1940, li laboris kiel privata instruisto kaj oficej-helpanto kaj en 1941 studentiĝis en la sociscienca fakultato de la Universitato de La Laguna (ULL), en 1945 finis la studojn kaj iĝis docento, poste profesoro (ĝis la amnestio en 1976, kiu sekvis la morton de Franco, li estis “provizora profesoro”) en ULL ĝis sia emeritiĝo en 1984. En 1950 li doktoriĝis pri filozofio. Juan Régulo Pérez bone posedis krom la hispanan kaj Esperanton ankaŭ la latinan, francan kaj portugalan, legis krome en la angla, itala kaj kataluna.

En 1950 li akiris presejon kaj ekde 1952 eldonis librojn en la hispana kaj en Esperanto. Verkis ok librojn kaj ĉ. ducent artikolojn en la hispana lingvo, precipe pri Kanarioj. Profesoro Régulo estis koresponda membro de la Reĝaj Hispanaj Akademioj pri Historio (1980) kaj pri Lingvo (1981). Okaze de lia emeritiĝo la 26an de oktobro 1984 okazis solena ceremonio, en kiu li ricevis la titolon “Adoptita filo de La Laguna” (la plej honora distingo en la urbo), kaj apud ULL estis inaŭgurita Placo Dr Régulo Pérez. Omaĝe al li ULL eldonis kvar volumojn de *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*.

En 1947 li edziĝis kun María del Carmen Rodríguez Hernández (1915-2014); kvar filinoj: María del Pilar Régulo Rodríguez (1947), Ana de los Reyes Régulo Rodríguez (1950), Isabel María de las Nieves Régulo Rodríguez (1955), Clara María del Carmen Régulo Rodríguez (1959). En aŭgusto 1988 li suferis cerebran infarkton okcipitan, perdis la paŝkapablon kaj la reston de sia vivo pasigis en sia

hejmo. Juan Régulo Pérez mortis la 27an de januaro 1993 en La Laguna. Okaze de lia centjariĝo (2014) en Garafía okazis ekspozicio pri li.

Juan Régulo Pérez lernis Esperanton en 1932. En 1933-36 li instruis la Internacian Lingvon al lernejoj, laboristoj, virinoj k. a. En 1935 ricevis diplomon de Hispana Esperanto-Instituto. Redaktis la laboristan Esperanto-gazeton *Nia idealo* (1936). Instruis Esperanton ĉe ULL en 1947-49, 1955-63 kaj aliloke. En decembro 1963 iĝis profesoro de Esperanto en la Instituto pri Lingvo ĉe ULL, kie li oficiale instruis Esperanton kaj ties kulturon ĝis 1983.

Liaj artikoloj aperis en la antologio *Sub la signo de socia muzo* (1987); en la artikolaroj *Sciencaj Studoj* (1958), *Centjara Esperanto* (1987), *Memorlibro pri la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco, Graz 1987* (1989); en la festlibroj omaĝe al R. Haupenthal, I. Lapenna kaj G. Waringhien. Li estis redakciano de *La Nica Literatura Revuo* (1955-62); kunlaboris ankaŭ en *Boletín, Esperanto, Horizonte, Internacia Kulturo, Malgranda Revuo, Monato, Monda Kulturo, Nia Gazeto, Senacieca Revuo, The British Esperantist* kaj multaj aliaj Esperanto-gazetoj. Verkis plurajn antaŭparolojn por libroj de *Stafeto*, sed ne sukcesis eldoni sian propran artikolaron *Rikolto*, kiu aperis ĉe *Fonto* nur kelkajn monatojn antaŭ lia morto kun kvin sekcioj sur 596 paĝoj: “Kanarioj” (20 verkoj), “Esperantio” (34), “Filologio” (27), “Filozofio” (16), “Recenzoj” (28) kaj du tradukoj.

En sia propra presejo-eldonejo ekde 1952 Régulo Pérez komencis eldoni librojn en la serio *Stafeto*. Entute, dum 1952-76 aperis 94 libroj kun sume 19 mil 302 paĝoj. Inter ĉi tiuj libroj estis *Kvaropo* de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti (1952); *Kontralte* de M. Boulton (1955); *La infana raso* de W. Auld (1956); *La floroj de l' malbono* de Ch. Baudelaire (Tr. K. Kalocsay kaj G. Waringhien, 1957); *Esperanta antologio* (1958); *Lingvo kaj vivo* de G. Waringhien (1959); *Ŝtupoj sen nomo* de B. Ragnarsson (1959); *Kiel akvo de l' rivero* de R. Schwartz (1963); *33 rakontoj* (1964); *Kantoj kaj romanoj* de H. Heine (Tr. K. Kalocsay kaj G. Waringhien, 1969); *Cigana Romancaro* de F. García Lorca (Tr. F. de Diego, 1971); *Proverbaro Esperanta* de L. Zamenhof (1974) k. m. a. Precipian sukceson en la serio *Stafeto* havis la subserio *Beletraj Kajeroj* de poŝformataj libretoj. Ekde 1976 libroj de *Stafeto* estis eldonataj de la eldonejo de Torben Kehlet kun la marko *TK/Stafeto*, sed ĝi eldonis nur 11 librojn; poste la serion *Stafeto* daŭrigis la eldonejo de Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno. En 1988 UEA reprenis el La Laguna grandan stokon da nevenditaj libroj.

Juan Régulo Pérez estis membro de la Akademio de Esperanto ekde 1953 ĝis sia morto kaj membro de AIS ekde ties fondo (1983). En 1974 proteste kontraŭ la komitataj elektoj de UEA en la 59a UK (Hamburgo) li demisiis el siaj oficoj en UEA (Komitatano B, membro de la ekzamena komisiono, profesoro de ISU, delegito de UEA), sed en 1984 akceptis la honoran membrecon en UEA kaj estis rektoro de IKU en la 72a UK (Varsovio, 1987). La biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio nun estas nomata “Biblioteko Juan Régulo Pérez”.

Pri Juan Régulo Pérez

Konsultlibroj: AIS, p. 259; CEOLE, p. 261-263; HEL, p. 257, 259-260; OVP, p. 194-195.

Libroj: Régulo Pérez J. *La eldona Stafeto-aventuro (Menade bal pŭki bal: Festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal*. Saarbrücken, 1998, p. 317-328); *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*. 4 vol. La Laguna, 1985-1990; Trujillo Casañas L. *Juan Régulo Pérez, una aproximación a su vida y obra*. La Laguna, 2017.

Gazetoj: *Esperanto*, 1959, №2 (Respondoj al enketo); F. S. *La kreanto de la dekjara "Stafeto" (Norda Prismo, 1963, №1)*; Diego F. de. *La 50a volumo de Stafeto (Esperanto, 1965, №4)*; Régulo Pérez J. *Stafeto: Homaranisma kultur-aventuro (Fonto, 1984, №51)*; *Esperanto*, 1984, №11 (HM de UEA); Marco Botella A. *Don Juan Régulo Pérez (Boletín, 1993, №310)*; Kock E. de. *Juan Régulo Pérez (Esperanto, 1993, №3)*; Haupenthal R. *La eldon-aventuro de Stafeto (La Ondo de Esperanto, 2011, №7)*; Minnaja C. *Amble kun Juan Régulo Pérez (Literatura Foiro, 2014, №270)*.

Retejoj: Trujillo Casañas L. *El garafiano Juan Régulo fue el más firme valor del esperantismo en Canarias* http://www.eldiario.es/lapalmaahora/cultura/Leandro_Trujillo_Casanas-esperantista_0_311469907.html; Hernández Sánchez C. *Juan Régulo Pérez* <http://garafianos.blogspot.ru/2012/12/juan-regulo-perez.html>; Sanz D. *Juan Régulo, un garafiano universal* <http://lapalma.diariodeavisos.com/2014/04/01/anuncio-de-juan-regulo/>.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

La aŭtoroj dankas al Antonio del Barrio, Ana Manero, Carlo Minnaja kaj Leandro Trujillo Casañas, kiuj helpis verki la enciklopedian tekston pri Juan Régulo Pérez, kies gazeta versio aperas ĉi tie.

Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonantoj: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en la fino de la Zamenhofa Jaro 2017

Prezo: 30 eŭroj

Antaŭmendebla kontraŭ 25 eŭroj



Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2018

10. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Theodor Ĉejka** (1878-1899-1957), ĉeĥa instruisto kaj esperantisto, aŭtoro kaj kunaŭtoro de pluraj E-lernolibroj kaj vortaroj por ĉeĥoj, instruisto de Esperanto, eldoninto de *Revuo Internacia*, *Germana Esperantisto*, *Bohema Esperantisto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*, membro de la Lingva Komitato ekde ties fondo (1905) ĝis 1923.

12. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Lucien Bannier** (1893-1906-1986), franca bankoficisto kaj esperantisto, kunfondinto (kun Lanti kaj Glodeau) de SAT, dum pli ol 60 jaroj membro de la gvidorgano (nun: plenumkomitato) de SAT, ĝenerala sekretario kaj prezidanto de la plenumkomitato de SAT (1935-68, kun paŭzo dum la Dua Mondmilito), administranto de la eldonado de PV (1930) kaj de PIV (1970), kompilinto de *Leteroj de E. Lanti* (1940), kunverkinto de *Historio de SAT* (1953). Oni ofte nomis lin "La konscienco de SAT".

14. Antaŭ 60 jaroj mortis **Paul Nylén** (1870-1902-1958), sveda ĵurnalisto kaj esperantisto, redaktoro de la dua Esperanto-gazeto *Lingvo Internacia* (1897-1901), kunfondinto (1922) kaj estrarano de Sveda E-Instituto; prezidanto (1918-21, 1924-34), afergvidanto (1923-24) kaj honora prezidanto (1921-23, 1934-58) de Sveda E-Federacio, membro (1908-58) kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto (1933-37), aŭtoro de E-lernolibroj kaj vortaroj, i.a. de la sveda versio de la E-ŝlosilo de Ĉefeĉ (1906), kiu havis 20 eldonojn.

15. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Itô Kanzi** (1918-1959-2005), japana eldonisto kaj esperantisto, verkinto de okvoluma japanlingva romano pri Zamenhof (1967-1983); kun la pseŭdonimo Ludovikito (Ludoviko + Ito) kolektis, editoris kaj publikigis verkojn kaj tradukojn de Zamenhof, aliajn tiutempajn dokumentojn, presaĵojn kaj leterojn kadre de la 58-voluma eldonprojekto konsistanta el tri libroserioj.

17. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis **Louis Couturat** (1868-1914), franca filozofo, interlingvisto kaj idisto, iniciatinto kaj fakta gvidanto de la Delegacio por akcepto de la lingvo internacia (1901), kunaŭtoro (kun Léopold Leau) de la fundamentaj interlingvistikaj studoj *Histoire de la langue universelle* (1903) kaj *Les nouvelles langues internationales* (1907), la ĉefa aŭtoro de la planlingvo Ido (1907).

27. Antaŭ 25 jaroj mortis **Juan Régulo Pérez** (1914-1932-1993), hispana instruisto, profesoro kaj esperantisto, membro de la Akademio de Esperanto (1953-93), konsiderata kiel la plej grava Esperanto-eldonisto, kiu dum 1952-76 kadre de la serio *Stafeto* aperigis 94 librojn kun sume 19.302 paĝoj; inter ĉi tiuj libroj estis *Kvaropo* de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti (1952); *Kontralte* de M. Boulton (1955); *La infana raso* de W. Auld (1956); *Esperanta antologio* (1958); *Lingvo kaj vivo* de G. Waringhien (1959); *Ŝtupoj sen nomo* de B. Ragnarsson (1959); *Kiel akvo de l' rivero* de R. Schwartz (1963); *33 rakontoj* (1964); *Proverbaro Esperanta* de L. Zamenhof (1974) k. m. a.

Kompilis **Aleksander Korĵenkov**

Kulturo



Anton Ĉeĥov, kiun ekster Ruslando oni (tute prave) taksas kiel aŭtoron “grandiozan kaj seriozan”, en sia patrolando, precipe inter la simplaj homoj foregaj de literatura kritiko, kutime estas konsiderata kiel humurverkisto №1 en la rusa literaturo. Ĉi tiun reputacion li akiris ne laste per Kristnaskaj rakontoj, kiujn en la komenco de sia kariero li ĉiujare verkis por gazetoj.

Ŝuisto

kaj malsankta potenco

Estis antaŭkristnaska tago. Maria jam delonge ronkis sur forna kuŝejo, en la lampeto forbrulis la tuta petrolo, sed Fjodor Nilov plu sidis kaj laboris. Li delonge forlasus la laboron kaj elirus straten, sed la sinjoro el Sonoril-strato, mendinta botojn antaŭ du semajnoj, hieraŭ venis, sakris kaj ordonis fini la tuton nepre nun, antaŭ la Kristnaska diservo.

– Jen vivaĉo bagna! – grumblis Fjodor laborante. – Iuj dormas jam delonge, aliaj diboĉas, sed vi jen, kvazaŭ ia Kaino, sidu kaj kudru diablo scias por kiu...

Por ne ekdormi hazarde, li jen kaj jen prenis el sub tablo botelon kaj trinkis rekte el ĝi, post ĉiu gluto turnadis la kapon kaj diris laŭte:

– Pro kiu ordo, diru bonvole, la mendintoj diboĉas, sed mi devas kudri por ili? Ĉu pro tio, ke ili monon havas, sed mi estas senhavulo?

Li malamis ĉiujn mendantojn, precipe tiun loĝanton de Sonoril-strato. Tiu estis deprime aspektanta sinjoro, longhara, flavvizaĝa, kun grandaj bluaj okulvitroj kaj kun raŭka voĉo. Familinomon li havis germanan, apenaŭ prononceblan. Kiun rangon li havis kaj pri kio okupiĝis, estis nekompreneble. Kiam antaŭ du semajnoj Fjodor venis al li por mezurado, li, la mendinto, sidis sur planko kaj pistis ion en ujo. Antaŭ ol Fjodor povis saluti, la enhavo de la pistujo subite ekbrulis per forta ruĝa flamo, ekfeteris sulfuro kaj brulantaj plumoj, kaj la ĉambro pleniĝis per densa rozkolora fumo, do Fjodor kvinfoje ternis, kaj poste, revenante hejmen, pensis: “Kiu Dion timas, tiu ne okupiĝos pri tiaj aferoj”.

Kiam en la botelo restis nenio, Fjodor metis la botojn surtablen kaj ekmeditis. Li apogis la pezan kapon sur pugno kaj ekpensis pri sia malriĉeco, pri peza senĝoja vivo, poste pri riĉuloj, pri iliaj grandaj domoj, kaleŝoj, pri centrublaj bankbiletoj...

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa januara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Bonan Jaron 2018!

Ĉampano

(pensoj dum novjara postebrio)

Ne kreu ĉampanon. Ĝi sparkas kiel diamanto, diafanas kiel arbara roĵo, dolĉas kiel nektaro; ĝi pli valoras ol penoj de laboristo, ol kantoj de poeto, ol karesoj de virino, sed... restu for de ĝi! Ĉampano estas brila ĉiesulino, miksanta sian ĉarmon kun mensogo kaj arogo de Gomoro, ĝi estas orumita ĉerko, plena de senvivaj ostoj kaj ĉiaspecaj malpuraĵoj. Homo trinkas ĝin nur dum ĉagreno, funebro kaj optika trompo.

Li trinkas ĝin, kiam li estas riĉa, trosata, do kiam eliri al lumo por li same malfacilas kiel por kamelo trairi kudriltruon.

Ĝi estas vino de ŝtelintaj kasistoj, amfriponaj alfonsoj, senbridaj kapriculoj, ĉiesulinoj... Kie estas ebria diboĉado, malĉasto, trompado de proksimulo, triumfo de fi-negoco, tie antaŭ ĉio serĉu ĉampanon. Por ĝi oni pagas ne perlaboritan monon, sed hazardan, superfluan, frenezan, ofte fremdan...

Surpaŝante glitan vojon, virino ĉiam komencas de ĉampano, — tial ĝi siblas, samkiel serpento, deloginta Evan!

Oni trinkas ĝin dum fianĉiĝo kaj dum edziĝo, kiam pro du-tri iluzioj oni surprenas pezajn katenojn por tuta vivo.

Oni trinkas ĝin dum jubileoj, diluante per flatoj kaj akvecaj paroladoj, je sano de la jubileanto, kiu kutime jam per unu piedo staras en tombo.

Kiam vi estas mortinta, ĝin trinkas viaj parencoj pro la ĝojo, ke vi lasis al ili heredaĵon.

Oni trinkas ĝin dum festado de Novjaro: kun pokaloj en manoj oni krias al ĝi "Hura!" en plena certeco, ke precize post 12 monatoj oni batos tiun jaron je kolo kaj kraĉos sur ĝian kapon. Do resume, kie estas ĝojo laŭ mendo, aĉetita ekzalto, flitado, vortlakso, kie estas trosatiĝo, paraziteco kaj porkeco, tie vi ĉiam trovos *vidvinon Clicquot*. Ne, tamen, prefere for de la ĉampano!

Tradukis **Valentin Melnikov**



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Memzorga tabulo?

Mi aldonas la portretojn de Valdemar Langlet kaj Nina Borovko Langlet, kaj la memoŝildon pri Valdemar en Budapeŝto. (<http://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/2017/12/17/valdemar-langlet-nina-borovko>).

La apetito de TEJO, aŭ: Manĝu informadike

Kongruante kun mia sperto mi ĉefe okupiĝos pri disvolvigo de la komputilaj servicoj kiujn TEJO ofertas... (tejo.org/paul-helly-la-nova-volontulo-de-tejo/).

Vakua oficiro

...la NKVD-oficiro Aleksander Miĥailoviĉ Orlov... en 1938 dezertis al Usono... (Stalino: *Pri la mankoj de la partilaboro kaj la disponoj por likvidi la trockistajn kaj ceterajn falslangulojn* / Tr. V. Lutermano, Embres-et-Castelmaure: MAS, 2016, p. 74; trovis Ionel Onet).

Reago tute forsenda

... koran dankon pro Via interesa, informriĉa kaj pensiiga respondo! (Uwe Stecher, 2 dec 2017, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/uea-membroj>; trovis Lu Wunsch).

Ĉu logi homon fluge en balo?

La virina kuba teamo de flugbalo... unue venkis sian homologon el Dominika Respubliko... (dissendolisto de Esperanto@ain.cu, 4 jun 2007).

Post flugo bala, arto bala

Kun la rezultoj de la Balartaj Konkursoj de UEA vi povas konatiĝi legante la numeron 334... (Barbara Pietrzak, 1 aŭg 2009, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/4596>).

De in-formoj al sun-tendoj

Jam de kvar jaroj, la tuta celo de EKO-komunikoj estas "ke rapide fluu informoj". Ĉu ne suntendinde? (Stefan MacGill, 4. sep. 2017, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/10501>; rimarkis Lu Wunsch).

Inter spektado kaj ekspektorado

Ĉio en bona stilo, kiel ni povas ekspekti de la aŭtorino... (Anneke Schouten-Buijs: Recenzo // *Fenikso* 2017, №5, p. 3; trovis Ionel Onet).

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

